

LA LAMPIRO


61-a jaro, numero 165, 2020: 5



La paradokso de la ĝemeloj

Machado de Assis

Fiere sin prezentas al la esperantistoj!





Titolo: Postmortaj rememoroj de Brás Cubas
Tradukis: Paulo S. Viana
Eldonejo: EASP, 2019
Formato: 21 cm, 248 paĝoj

Prezo: R\$ 35,00

Titolo: Esav kaj Jakob
Tradukis: Paulo S. Viana
Eldonejo: EASP, 2019
Formato: 21 cm, 272 paĝoj

Prezo: R\$ 35,00



Titolo: Dom Casmurro
Tradukis: Paulo S. Viana
Eldonejo: EASP, 2019
Formato: 21 cm, 260 paĝoj

Prezo: R\$ 35,00

LA LAMPIRO

61-a jaro, numero 165, 2020: 5

Organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Redaktanto: Paulo Sérgio Viana (psviana@terra.com.br)

Grafikaranĝo: Cristovão Rocha Sousa

Revizianto: José Roberto Tenório



La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj artikoloj

Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Fondita en la 29-a de Marto 1937

Propra Sidejo

Rua Faustolo, 124 - Água Branca
05041-000 São Paulo, SP - Brazilo
Telefonnumero: +55 (11) 3862-1183
easp.org.br | contato@easp.br

Jarkotizo por 2020

Simpla membro.....R\$ 150,00.
Subtena membro.....R\$ 300,00.
Ŝtatinterna membro.....R\$ 75,00.

Dejoroj:

Sabate: 9h - 12h
Escepte en la lasta sabato de ĉiu monato, kiam la deĵoro daŭras de la 9-a matene ĝis la 7-a vespere pro la Kultura Kunveno, kiu okazas posttagmeze (ekde la 16h).

Estraro

Prezidanto: Esmeraldo Alencar Lima

Vicprezidanto: Paulo Sérgio Viana

1-a Sekretario: José Roberto Tenório

2-a Sekretario: Sidnéia da Conceição Beall

1-a Kasisto: Conceição Rodrigues

2-a Kasisto: Maria Delza Macabu

Direktoro pri propagando: Genildo Martins
Coelho

Konsilantaro

Audino Castelo Branco, Marcos Zlotovich kaj
José Mauro Progiante

Anstataŭantoj

Shigueco Takahasi kaj Cristovão Rocha Sousa

ENHAVO

7

Intervjuo

11

Nia plej grava poeto

12

La sep pekati mortal
de Esperanto

14

Odoro de bakita
viando

15

Nur sciulo povas
esti humilulo

17

La arto komunikiĝi

18

Arte... farita
lakto kaj pli

20

Kien ni iras, kiam ni
mortas?

22

La graveco de
kantotekstoj
kaj la ebleco uzi ilin
por lernado de nia
lingvo

26

La paradokso de la
ĝemeloj

28

Librorecenzo:
"Ĉasisto de Songĝoj"

30

Eminenta Civitano

31

Lingvaj Respondoj



Vortoj de la prezidanto

Kun granda plezuro mi skribas al vi ĉiuj.

Ni trapasas tre delikatan tempon, dum kiu ni devas resti hejme, pro sankrizo. Tamen ni ne devas ĉesigi niajn interparolojn. Mi invitas vin al nia virtuala “Kafejo kun EASP”, kiu okazas ĉiusabate, je la 17-a horo.

Nia kafejo estas plezura momento, kiam ni parolas pri diversaj temoj, tute libere, ni ridas, ni lernas, ni amuziĝas, ni amikiĝas. Estu do kore bonvena!

Sed ni bezonas ankaŭ vian helpon. Vi povas aktive kunlabori, se vi membriĝas al nia ŝtata asocio. Por aktiva agado por Esperanto en San-Paŭlo, ni tamen bezonas rimedojn. Nur tiel ni povos ampleksigi niajn laborojn, cele al informado pri Esperanto, kongresoj, kursoj, renkontiĝoj, virtualaj programeroj kaj nia revuo La Lampiro. Ankaŭ nia butikoj bezonas vian helpon por plua funkciado.

Helpu nin por ke ni helpu vin kaj progresigu nian movadon!

Fine, mi kore dankas al ĉiuj, kiuj kunlaboris por la sukceso de nia “Ação entre amigos”.

ESMERALDO ALENCAR LIMA



Vortoj de la redaktanto

Estimata leganto,

ŝajnas, ke freŝa vento blovas en EASP. La nova estraro, sub tre amika kaj demodratieca gvidado de nia prezidanto Alencar Esmeraldo, komencas iniciati novajn agadojn por nia movado. Ekzemplo pri tio estas la EASP-Kafejo, nome virtuala babilado okazanta ĉiusembe, de la 17-a ĝis la 18-a horo. Ĉiu samideano estas invitata, kaj por tio sufiĉas peti aliron al nia prezidanto. Krome, niaj virtualaj kulturkunsidoj daŭre okazas en tiu sama horo, ĉiam en la lasta sabato de ĉiu monato. Oni rajtas fari demandojn al la preleganto kaj komentojn al ĉiuj.


Alia novaĵo estas nia “Esperanto-Notícias”, nome informbulteneto aperanta dufoje en ĉiu monato, kun informoj pri niaj movado kaj kulturo, en la portugala lingvo. Ni disdonas ĝin al ĉiuj membroj de EASP, kun la peto, ke ili siavice transsendu ĝin al siaj kontaktoj, aparte al neesperantistaj homoj kaj kulturinstancoj (radistacioj, ĵurnaloj, kulturdomoj, bibliotekoj, universitatoj, kluboj, lernejoj kaj al homoj respondecaj pri kulturaj aferoj). Tio estas parto de nia kampanjo, por diskonigi nian lingvon kaj movadon en la ekstera socio.

Alia grava novaĵo estas la reaktivigo de nia “Viva Gazeto”. Ĝi estas la kanalo de EASP en YouTube. Bonvolu viziti ĝin, aboni ĝin kaj “ŝati”, se vi ŝatas... Kaj EASP invitas vin mem produkti etajn filmojn por eventuala publikigo.

Freŝa vento, fakte!

PAULO SÉRGIO VIANA

Intervjuo



kun Ivan Colling,

eminenta, veterana brazila Esperantisto

1. La Lampiro: bonvolu vin prezenti

Mi nomiĝas Ivan Eidt Colling, mi naskiĝis en Sero-Largo (Cerro Largo), Suda Riogrando. Mi diplomitiĝis pri Elektra Inĝenierado (UFSM), Fiziko (UFPR) kaj Pola Filologio (UFPR), magistriĝis kaj doktoriĝis pri Elektra Inĝenierado (UFSC). Mia edzino, Rita, kaj mi sekvis Post-Diploman Kurson pri Interlingvistikaj Studoj en Universitato Adam Mickiewicz, en Poznano, Pollando (2011-2014). Post 18-jara laboro kiel docento en fakoj ligitaj al inĝenierado kaj matematiko en kvar Universitatoj en ŝtato Paranao, antaŭ du jaroj mi faris transiron al la Pola Fakoj de Departemento pri Polistiko, Germanistiko kaj Klasika Filologio de Federacia Universitato de Paranao (UFPR), en Kuritibo.

Mi laboras en du projektoj de por-komunuma agado (portugale ni nomas tion “projetos de extensão universitária”), kiujn mi helpis krei: “Elektrizi” (“Eletrizar”), por alproksimigi sciencan kaj teknologian al lernejoj, kaj “Lingvoj en Dialogo” (“Línguas em Diálogo”), kies celo estas sent-emigi la publikon (ĉefe lernejojn) pri lingva diverseco kaj senpage instrui lingvojn (inter ili, evidente, la polan kaj Esperanton). Dum tri jaroj mi laboris en projekto por instruado de la portugala al migrantoj. Ekde 2009 mi agadas en

Centro de Lingvoj kaj Interkulturo (CELIN/UFPR); komence mi estis volontula instruisto de Esperanto; en 2013 mi fariĝis kunordiganto de projekto “Esperanto – Lingvo kaj Kulturo”. En ĉi tiu Centro ni ankaŭ okazigis sep sesiojn de KER-Ekzamenoj (2012-2018).

Mi estis prezidanto de PEA – Paranaa Esperanto-Asocio (2010-2014), estrarano de ILEI (2015-2018) kaj estas ekde 2018 vicprezidanto de ILEI. Mi estas ankaŭ rajtigita ekzamenanto de KER-Sistemo. Mi faris plurajn prezentojn pri Esperanto kaj pri interlingvistiko, publikigis artikolojn (mi ricevis premion Germain Pirlot de AIS en 2016 pro artikoloj publikigitaj en GRKG), kaj ankaŭ gazetajn tekstojn, estis plurfoje intervjuata en UFPR. Dum unu jaro mi partoprenis televidprogramon de la Komunuma Televidkanalo. Pasintjare Docento Fernando Pita kaj mi kunordigis Simpozion “Esperantologio kaj Interlingvistiko” kadre de la 1-a Internacia Renkontiĝo pri Polaj Studoj en UFPR. Nedevegaj lernobjektoj de mi proponitaj estas nun en la nova instruprograme de Filologiaj Kursoj de la Universitato: “Interlingvistiko” (30h), “Esperanto 1” (60h) kaj “Esperanto 2” (60h). Pro mia agado, en 2017 mi estis enkondukita en Panteonon de Edukado.net. Interesatoj baldaŭ

povos spekti la prezentaĵon, kiun mi faris en VEKI pri Esperanto kaj Interlingvistiko en UFPR: <<https://youtu.be/8eBRvDU2kFU>>.

2. Kio kondukis vin al Esperanto?

Scivolemo pri lingvoj! Ekde kiam mi akiris memkonscion, mi estas lingvemulo. Infanaĝe mi vivis en medio, kie kunestis pluraj lingvoj: portugala, germana, itala, pola, hispana. Hejme estis libroj pri la germana, angla, franca kaj Latino – mia patrino dum iom da tempo estis instruistino de la germana. La mondo malfermiĝis al mi, kiam mi malkovris mallongondojn. Mi skribis al la radiostacioj, kaj ricevadis programbultenojn el diversaj lokoj, inter ili de Radio Vatikana, kaj tie aperis “Esperanto” inter la lingvoj de la elsendoj. Tio instigis mian scivolon, sed respondo venis nur kiam mia onklo, tiam studento en Portoalegro, feris ĉe ni. Li bonege klarigis al mi, ke temas pri planlingvo, kaj poste eĉ trovis dulingvan revuon pri ŝako, kaj donacis abonon al mi! Tiam mi estis 11-12-jara. Mi nur sukcesis fakte eklerni la lingvon post kvin jaroj en la Universitato, en Sankta-Mario, kiam estis mirinde bona senpaga 20-hora fulma, intensa kurso dum ununura semajnfino, kiun gvidis instruistino Zélia Zaghetto, el Portoalegro. Mi tiam kaptis la bazan gramatikon de Esperanto. Tio estis la plej profita, instrua semajnfino en mia tuta vivo! Mi ege dankas Zélia-n pro tio!

3. Kion vi opinias pri la lingvistikaj universitataj kursoj en Poznan (Pollando)?

Fakte la post-diploma kurso estas pli ampleksa – tie ni studas, krom lingvistiko, ankaŭ literaturon, kulturojn de Esperanto, historion, interlingvistikon, lingvopedagogion. Temas pri mirinda iniciato kaj laboro de Prof. Ilona Koutny, kiu sekvas la tradicion de Prof. István Szerdahelyi. Ĝi (bedaŭrinde) estas unikaĵo. En la kurso internacia teamo de prelegantoj kaj diversorigina studentaro studas, debatas universitatnivele, en Esperanto, pri tiuj diversaj temoj. Plejparto el la legenda materialo estas en Esperanto, kiu estas ankaŭ la lingvo uzata en taskoj, laboraĵoj kaj ekzamenoj. Kompreneble estas plibonigendaj punktoj, ĉar oni ĉiam devas konscii, ke temas pri multkultura grupo, kun gestudentoj el pluraj landoj, kun diversaj akademijaj tradicioj. Cetere, la kostoj (ĉefe vojaĝkostoj) por neeŭropanoj fariĝas tro altaj. Sed kiam homoj demandas min pri la vivanteco de Esperanto, la komenco de mia respondo estas, ke mia edzino kaj mi sekvis post-diploman kurson en la lingvo. Tio signifas, ke ĝi ne nur estas vigla kaj vivanta, sed ke estas homoj kapablaj ĝisfunde analizi kaj pripensadi lingvon, komunumon, historion, literaturon, kulturajn manifestiĝojn. Multaj etnaj lingvoj ne havas tion. Ĝi montras la maturecon

de Esperanto-komunumo, sed samtempe laŭŝajne mankas interesatoj, kiuj emas sindediĉi al tiu studado. La lernitaĵoj el Poznano estas grava parto de la sciaro, kiun mi uzas en mia universitata laboro – ne nur por Esperanto!

4. Kiel statas la nuntempa ILEI?

ILEI estas vigla kaj matura Ligo. Nia lasta Virtuala Konferenco, VEKI, estas pruvo pri tio. La estraro de ILEI kaj ties Komitato konstante debatas pri la plej diversaj temoj ligitaj al la vivo de la Ligo. Miaopinie, Mireille Grosjean kompetente kaj diligente prezidas la Ligon. Kunsidoj oftas, kaj diverseco de opinioj kaj de aliroj estas en la estraro, en kiu diversaj mondopartoj estas reprezentataj. Nuntempe ankaŭ Universitata Agado estas en la fokuso de ILEI; mi pensas, ke tio ege gravas pro la multobliga kapablo de universitatoj. Ni ankaŭ preparas, sub kunordigado de Katalin Kováts, la novan, kvaran eldonon de Manlibro pri instruado de Esperanto, kiu baldaŭ haveblos – laŭ mi, ĝi estos epokfara. La Brazila Sekcio estas aktiva, sub la gvido de Aristophio Alves Filho, kiu ankaŭ prizorgas a Jutub-kanalon de ILEI. Malgraŭ tiu laboro kaj vicleco, tamen, ni antaŭvidas financajn problemojn, kiuj eble havos malbonan efikon sur niajn servojn. Do, mi instigas ĉiujn, kiuj pensas, ke valoras la penon labori pri edukado kaj pri Esperanto, apogi ILEI-on. Se oni mem ne instruas, oni povas subteni la sendadon de ILEI-publikaĵoj al nepagipovaj instruistoj.

5. Lastatempe, Katalin Kováts (la redaktoro de edukado.net) plendas, ke malmultaj kursoj de Esperanto enskribiĝas en ŝia retejo. Kial tio okazas?

Mi ne certas, ĉu mi havas respondon al ĉi tiu demando! Mi povas tamen registri miajn pensojn pri la temo. Eble oni ne ankoraŭ konsciigis, ke ni bezonas centran ejon, kiu ricevas informojn el ĉiuj lokoj kaj disponigas tiujn informojn al la komunumo. Tio estas bazo por statistika analizo, por kunordigado de iniciatoj, por difino de strategio. Se temas pri esperantistaj universitatoj, ni al kutimiĝis al iom izola agado. Tempo malmultas, ni apenaŭ sukcesas fini la taskojn de la hodiaŭa tago, kaj Esperanto-agado ofte estas io kroma, al kiu ni devas dediĉi la apenaŭ ekzistantajn liberajn horojn...

6. Kion vi konsilas al brazilaj kursgvidantoj? Kaj al komencantoj? Mi ĉiam tenas enmense, ke instruado estu spaco de respekto kaj libereco instiganta scivolemon kaj kreopovon. Kursgvidantoj ne sekvu dogmojn. Estas kelkaj mitoj pri instruado ĝenerale kaj specife pri instruado de Esperanto. Se oni rapide lernis la lingvon kaj entuziasmas pri ĝi, oni tamen ne atendu la samon de la gelernantoj. Ni devas ĉiam esti atentaj pri la progreso de la afero ĉe la lernantaro, ĉe la konkreta grupo, kun kiu ni laboras, kaj provi respondi al iliaj bezonoj konsiderante iliajn kapablojn, iliajn kondiĉojn. Se tekniko bone funkcias ĉe unu grupo, tio ne signifas, ke ĝi bone funkcias

ĉe alia. Ni trovu bonajn materialojn (aŭ mem ellaboru ilin) – multaj libroj kaj aplikaĵoj haveblas, estas bonega kolekto en Edukado.net kaj en ilei.info. Ekzemple, ILEI disponigas la antikvajn numerojn de Juna Amiko. Oni ankaŭ subtenu la Ligon, por ke ĝi povu daŭrigi sian laboron, legu Internacian Pedagogian Revuon kaj Junan Amikon kaj kontribuu al tiuj publikaĵoj per registro de spertoj kaj raportoĵoj. Gravus ankaŭ, ke kiom eble plej frue oni prezentu historion kaj kulturojn de Esperanto. Lernantoj aŭdu ne nur la voĉon de la instruisto, sed ankaŭ de la kolegoj: oni paroligu la gelernantojn! Oni aŭdigu muzikaĵojn kaj radioelsendojn (Pola RetRadio, Ĉina Radio, Esperanta Retradio,...). Se oni ne ankoraŭ estas flua parolanto de Esperanto, oni tamen povas instrui la lingvon: en ĉi tiu situacio, oni devas klare anonci tion dekomence, kaj

antaŭenpaŝi kunlernante kun la grupo.

Mi forte rekomendas, ke oni legu la baldaŭ aperontan Manlibron pri instruado de Esperanto, ĉar en la kvara eldono estas granda salto en la kvalito de la enhavo. La libro estos aĉetebla paperforme kaj ankaŭ estos senpage elŝutebla.

Komencantoj: trovu bonan lernilon, kiu respondas al viaj interesoĵoj, al viaj bezonoĵoj, al via maniero lerni. Se necese, provu diversajn lernrimedojn, kaj malkovru, per kiu kanalo vi plej efike lernas: ĉu per aŭdado, vidado, palpado (ekz. tuŝante objekton kaj dirante ion pri ĝi). Memoru, ke lingvon oni lernas ne nur per la tradicia lernado, sed fakte (kaj eĉ pli efike) en ĉiuj situacioĵoj, en kiuj la lingvo estas uzata por iu celo, kiam vi ricevas/sendas sencohavan informon.



CELINA / UFPR

Iom da poezio

NIA PLEJ GRAVA POETO

Paulo S. Viana

Cecília Meireles naskiĝis en Rio-de-Ĵaneiro, en 1901, kaj mortis en 1964. Pentristino, instruistino, ĵurnalistino, tamen al ŝi ne plaĉis la termino “poetino”, sed simple “poeto”. Ŝi estis pioniro en la movado por kreo de infanbibliotekoj en Brazilo. Ŝia verkaro estas kontempla kaj melankolia. Ŝi estis grava figuro en la modernisma movado, en Brazilo. Eble nia plej grava poeto en la 20-a jarcento.:

Elegio

Cecília Meireles

Ĉi-monate, cikadoj kantas

kaj tondroj iras super la tero,

alkroĉitaj al suno.

Ĉi-monate, kiam la suno subiras, pluvo fluas sur montaroj,

kaj poste la nokto estas pli hela,

kaj la kanto de griloj tremigas la humidan odoron surgrunde.

Sed estas ĉio senutila,

ĉar viaj oreloj estas nun kvazaŭ malplenaj konkoj,

kaj via senmova nazo

jam ne ricevas informojn

pri la mondo, kiu rondiras en la vento.

La sep pekati mortal de Esperanto

CESAR DORNELLES

En la revuo *Universal*, n-roj 5-8, eldonita en Nurenbergo (1908), oficiala organo de planlingvo samnoma, troviĝas tre kurioza artikolo pri *Kritik de altr sistemoj* [*Kritiko al aliaj sistemoj*] en kiu la redaktoro D-ro Heinrich Molenaar, kreinto de la lingvo, prezentas en longa artikolo serion da kritika ekzamenado de diversaj planlingvoj kiuj tiuepoke konkuris kun Universal (1) kiel proponoj de planitaj internaciaj lingvo: Idiom Neutral, Novilatin, Nuove-Roman, Latino sine flexione, Apolema, Teutonish, Esperanto kaj Ido, provante montri la *avantaĝojn* de *Universal* rilate al la aliaj.

Antaŭ ol listigi al vi la *sep mortigajn pekojn de Esperanto*, trovatajn en la artikolo, mi prezentu kelkajn biografiajn donitaĵojn pri Heinrich Molenaar (1870-1965). Li estis germana instruisto pri la franca, filozofo kaj interlingvistikisto kiu naskiĝis kaj mortis en Bavario, sude de Germanio. En 1903 li kreis planlingvon nomatan Panroman, kiu poste estis renomita al *Universal* aŭ *Unial* ĝuste por montri sian internaciecon. Ĝia vortprovizo estis esence latinida sed la vortprononco estis adaptita al tiu de la germana. Post kelkaj jaroj li rezignis pri sia projekto kaj fariĝis adepto de Interlingvao.

Li akre kritikas Esperanton en la artikolo. Por li la lingvo de Zamenhof temas pri tiel *absurda projekto*, ke *tute ne eblas paroli pri ĉiuj ĝiaj malperfektaĵoj...* Sed li montras kelkajn, kiuj por ni esperantistoj sonas tute malpravaj kompreneble:

1. La vortprovizo de Esperanto baziĝas sur la mikso de *diversaj lingvoj* (*franca, germana, angla, slava ktp...*) kaj pro tio ĝi fariĝas *hibrida kaj malbela*.

2. Esperanto ignoras grandan kvanton da internaciaj vortoj. Li eĉ donas ekzemplojn de E-vortoj kun la respondaj vortoj en *Universal* por ekzempli tion:

vortaro = *dikcizionar*

malsanulejo = *hospital*

aliĝanto = *adepto*

ĉiuj = *tuti*

libertempo = *vakanz*

(...)

3. Esperanto *estas unuavide nekomprenebla...* Li prezentas la jenan tekston por demonstracii tion:

Esperanto - Ĉiuj ideoj, kiuj estas ludantaj gravan rolon en la historio de la homaro,

havas ĉiam tiun saman egalan sorton: kiam ili ekaperas, la samtempuloj renkontas ilin ne sole kun rimarkinde obstina malkonfido, sed eĉ kun la neklarigebla malamikeco: la pioniroj de tiuj ĉi ideoj devas multe batali kaj multe suferi; oni rigardas ilin kiel homojn frenezajn, infane malsaĝajn, aŭ fine eĉ rekte kiel homojn tre malutilajn.

335 literoj

Universal - Tut ideoj, quen luderó un part important in histori de humanitat, hab sempre egal fat: quand les apar, kontemporani encontr les non sole kon remarkable obstinat difidenz, ma mem kon un inkomprensibl hostilitat; pioniri de il ideoj deb mult kombater e mult sufrer; on regard los kom homi frenetik, puerile imprudent, o fine mem kom homi mu inutil.

276 literi.

4. Esperanto *havas artifikan gramatikon kaj en multaj aspektoj kontraŭan al spirito de eŭropaj lingvoj. (...) Kiu homa cerbo povas enkapigi la faman tabelon de pronomoj kaj adverbi? kia kial kiam kie kiel kies kio ktp.*

tia tial tiam tie tiel ties tio ktp.

Ĉu en kiu lingvo ekzistas tia ekstravaganco? - demandas la artikolisto.

5. Esperanto *estas bedaŭrinde monotona kaj kakofonia pro la ofta uzo de*

la finaĵoj oj aj ojn ajn. Ekz. "multajn maloftajn specojn". U. "mult rar spezi".

6. Esperanto *esta multe pli longa ol aliaj sistemoj. En la menciita ekzemplo Esperanto uzas 23 literojn, Universal 12, tio estas malpli 48%.*

7. Esperanto *havas 5 literojn kun supersignoj kiuj ne ekzistas en la Morsa alfabeto (...).*

Nu bone, jen ekzemploj de argumentoj kiujn la kontraŭuloj de Esperanto utiligis en la pasinteco nome de ilia granda senco pri eŭrocentrismo... Feliĉe Esperanto iris antaŭen malgraŭ tio.

Referencoj

Kritiki de altr sistemi. Universal. Nurenbergo, n-ro 6-8 1908. P. 25-26.

https://eo.wikipedia.org/wiki/Heinrich_Molenaar

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Universal_\(Molenaar\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/Universal_(Molenaar))

https://fr.wikipedia.org/wiki/Heinrich_Molenaar

<https://fr.wikipedia.org/wiki/Panroman!>



Odoro de bakita viando

MARIA CECÍLIA MILANI

Kutime, kiam alproksimiĝas la Kristnaska festo, mi komencas senti la odoron de bakita viando.

Foje mi min demandis, ĉar mi loĝas en dometo, en kvartalo plena je grandaj domoj, ĉu la najbarinoj, unu semajnon antaŭ la Kristnasko, provas baki viandon por rememori sian recepton.

Ĉu, unu semajnon antaŭe, ili decidas suferigi min per la odoro de siaj bonaj pladoj? Mi ne trovis bonan respondon, ĉar mi ne kutimas baki buĉitajn bovojn, sed la odoro salivumigas min.

Bone, fine alvenas Kristnasko, kaj unu tagon antaŭ ĝi, mi denove suferadas pro la sama odoro de bakita viando, ne de unu sola najbarino, sed de du, kiuj havas siajn familianojn, kiuj venas por pasigi

Kristnaskon ĉe ili, festante kaj multe manĝante.

En la mateno antaŭ la Kristnaska tago, mi matenmanĝas sentante tre bonodoran viandbakadon, kaj mi min pretigas por viziti fratinon. Tie mi restos ĝis la tago post la Kristnasko. Feliĉe, tie troviĝos bongusta manĝo, kaj mi povos forgesi la odoron, kiu antaŭ kelkaj tagoj suferigis min.

Ho ve! post kelkaj tagoj mi denove estos trafita de la sama sperto, ĉar alvenos Novjaro. Mi ne manĝos, mi ne gustumos, sed la odoro eniros en mian domon sen peti permeson.

Ili festos, ili manĝos, kaj ili eĉ deziras al mi feliĉan Kristnaskon, bonan Novjaron, mi deziras la samon al ili. Neforgesebla bonodoro! ■

DINĈJO KAJ LA SORĈISTINO



Iom da filozofio

kun José Mauro Progiante

Nur sciulo povas esti humilulo

Eble la humileco estas la plej malfacile akirebla virto, kaj tutcerte ĝi neniam estas la unua, kiu disvolviĝas en la animo. La latina vorto humus, signifanta “grundo, tero” estas etimo de “humileco”, kiu ne hazarde, kiel delikata planto, bezonas specialajn kondiĉojn por ĝermi kaj kreski. Kaj la aliaj virtoj estas grasumoj de kiuj ĝi dependas.

Oni rekonas, ke iu homo estas humila, ĝuste pro la maniero, kiel li agas rilate siajn proprajn virtojn, ĉar esence la humilulo ne fieras pri ili. Same kiel plenkreskulo ne sentas sin supera al infano pro tio, ke li kapablas fari ion, kion la infano ne kapablas fari, la humilulo ne sentas sin supera pro la

fakto, ke li jam disvolvis tiun aŭ alian virton.

Ekzistas forta rilato inter humileco kaj sciado, paralele al la rilato inter orgojlo kaj nesciado. Ĝenerale la orgojlo signas mankon de scio. Kaj alia rimarkinda rilato ekzistas inter humileco kaj ĝojo. La konscio, kiun la humilulo havas pri siaj malfortaĵoj, ofte suferigas lin. Dume la orgojlulo, ŝtopita per memŝato, fanfaronas pri gajeco. Tamen, ĉu vera malĝojo ne valoras pli ol falsa ĝojo?

Granda kontraŭeco evidentiĝas, kiam oni rezonas pri tiu virto. Kvankam la sciado estas nepra por ĝia ekzisto, la humileco implicas senkonscion pri ĝia posedo mem kaj aliflanke la konscio pri ĝia malesto

montras antaŭpaŝon al ĝi. Tiel la diraĵo “mi estas humila” malkaŝas mankon de humileco kaj, kontraŭe, montras alproksimiĝon al ĝi la frazo “mankas al mi humileco”.

Oni ne konfuzu humilecon kun submetiĝo aŭ flatado. Neniu fariĝas virte humila pro la fakto, ke oni humiligas lin en la senco de trudo, de malaltigo.

Tio, kio konsciigas nin pri nia eteco kaj do inspiras al ni humilecon, estas la aferoj grandiozaj, ravaj, multfoje ekster nia komprenkapablo. Kiam ni atentis pri la aĝo kaj la

dimensioj de la universo, pri nia pozicio en la naturo, pri la sinoferoj de grandanimaj homoj, pri la multego da ankoraŭ akirotaj scioj, tiam ni hontas pri nia ridinda fiereco kaj ekzorgas pri la semoj de humileco en ni dormantaj.

La humilulo ne plu havas iluziojn pri si mem. Li jam akiris sufiĉe da intelektaj kaj moralaj scioj por kompreni sian rolon en la dramo de la vivo... kaj provas plejbone ludi ĝin, kiel ajn grava ĝi estas. ■



Caro Barros, Blogspot 2010

La arto komunikiĝi

ÍSIS C. OKABE PITON

Antaŭ kelkaj monatoj mi spektis tre interesan prelegon en Youtube pri la arto komunikiĝi. Prelegis Katia Campelo, parolterapiisto kaj instruistino pri oratorarto, pri la temo “Comunicação eficiente, resultados eficazes” (Efika komunikado, efikaj rezultoj).

Ŝi flue, klare kaj per elokventaj gestoj montris, ke nia voĉo, flueco, movoj, rigardo kaj gestoj influas en la rezulto de nia komunikado.

Iuj homoj aŭdas de aliaj pri sia maniero paroli, kiel ekzemple: plendo, ke la maniero paroli estas agresema kaj oni tion ne akceptas. Tio signifas, ke la komunikanto ne konscias pri sia aŭ alia komunikmaniero.

La prelego estis farita por entreprenistoj. Pro tio la alloga temo estis direktita al la kapablo komuniki. Por sukcesoj bonan vendadon, oni bezonas konscii pri la maniero kiel oni sin esprimas, ĉar la respondeco de la rezulto de la komunikado apartenas al la komunikanto.

Dum la prelego, Katia prezentis esploron de Kalifornia Universitato faritan en 1996 - 55% el la efektoj de nia komunikado estas kaŭzataj de nia korpa esprimo kaj 38% de nia parola esprimo kaj nur 7% de la enhavo de la temo. Tio montras, ke se oni ne scias komuniki efike, ne sufiĉas regi la temon.

Al la publikoj, la rezulto de la esploro ŝajnis bombasta, pro nekonscio de la graveco uzi la teknikojn por esti klara en tio, kion oni volas komuniki.

Por esperanta medio mi pensas ke

tiu esploro estas tre grava, ĉar se oni volas, ke nia mondo estu pli bona, pli komprenema, ni devas pensi unue kiel kaj kial ni komunikiĝas, kia estas nia reala intenco kiam ni parolas, ĉu ni vere volas, ke la alia komprenu nin. Ĉu ni vere kapablas aŭskulti kaj fari nian eblon por helpi solvi problemon de nia kunparolanto?

Se por viaj demandoj la respondo estas sincere agi pli bone por ni mem kaj por nia mondo, la unua paŝo estas konstati tion, kion mankas plibonigi en si mem, kaj kiamaniere vi povas plibonigi viajn kapablojn. Prelegoj, kursoj, libroj pri la temo ĉiam estas bonvenaj. Pacienco, empatio estas la ŝlosilo por atingi interkomprenon. “Aplaŭdo nur eblas kiam ni frapas du manojn”. Veras tiu ĉi popola diraĵo, por batalo kaj interkompreno ni bezonas almenaŭ du homojn.

En la kampo de la sentoj, ne ĉiuj homoj estas egalaj, ni bezonas amon, komprenon kaj komprenemon, sed por nia travivo en la interrilato, egaleco en la trajtoj ne sufiĉas, ni bezonas unu paŝon plian, ni bezonas kompreni, ke ĉiuj bezonas malsamajn atentojn ĉar nia individueco malsamas kaj, komprenante tion, ni devas atentigi pri tio, kia sinteno helpas en malsamaj situacioj kun malsamaj homoj. Nur kiam oni vere volas kaj deziras, kunvivante kaj travivante, ni lernas kiamaniere agi ĉe malsamaj homoj. Ne estas facile, tamen la deziro bone kunvivi kaj ŝati esti kun homoj kaj kunvivi lernigas nin al bona vojo kaj solvoj. ■

Arte... farita lakto kaj pli

JAMES REZENDE PITON (PAULÍNIA-SP)

Unu el la problemoj, kiuj ege zorgigas pri la estonteco de nia planedo - kaj sekve de la homaro - estas la granda, senĉese kreskanta premo por pli da nutraĵoj, bonkvalita kaj alireblaj al ĉiuj. Niaj pli ol 7 miliardoj da "kunpasaĝeroj" tre malegale aliras manĝaĵojn, kun ĉ. 800 milionoj da malsatantoj tra la mondo kaj preskaŭ 2 miliardoj da malsufiĉe, nesekure aŭ neregule nutrataj homoj.

El tiuj, 43 milionoj troviĝas en Brazilo, laŭ datumoj de FAO (Organizaĵo pri Nutrado kaj Agrikulturo de Unuiĝintaj Nacioj). La kvanto da okazoj de anemio kaj trodikeco konfirmas la efektive netaŭgan nutraron. Superpezeco en homoj kun malmulte da manĝaĵoj estas des plia indiko pri la netaŭgeco de tio, kion ili manĝas.

Kaj tio tre koncernas nin, brazilanoj. Ĉefe pro tio, ke misnutrado plu estas problemo en kelkaj landopartoj kaj en ĉiuj sociaj klasoj. Sed ne nur: ankaŭ pro la granda premo, kiun pli kaj pli da bovobredado kreas en la naturmedio. Brazilo estas la tria plej granda lakto-produktanto en la mondo, kun pli ol 35 miliardoj da litroj produktitaj en 2018. Tiun kvanton superas nur Usono kaj Barato. Nia brutaro ampleksas proksimume 220 milionojn da bovoj

(por ne kalkuli pri same plurmilionaj kokinoj kaj porkoj, i.a.) kaj Brazilo estas la plej granda viando-eksportanto en la mondo.

Nur por la lakto-produktado, la mondo elĵetas 2 miliardojn da tunoj de CO₂ (karbona dioksido) en la atmosferon ĉiujare. Kiel konate, tiu gaso kaj aliaj, kiel metano (CH₄), kaŭzas damaĝon al nia planeda natura ŝirmilo kontraŭ radiacio kaj estigas tion, kio ricevas la nomon "forceja efiko", ĉar plikreskigas la tergloban temperaturon.

Certe reeduki la homaron al pli konscia nutrado, per reduktado de la konsumado de bestodevena proteino, estas necese. Sed tio postulas la klerigon de sinsekvaj generacioj. Malsatantoj ne povas dume atendi kaj ili ja ne atendas, ĉar iliaj infanoj simple mortas. En la malplej malbona okazo, tiuj infanoj kreskas kun defcito de nutraĵoj en grava fazo de la vivo, kun dumvivaj konsekvencoj por la sano kaj kapabloj.

Kion fari? Eblas okupi pli da spaco por la agrikulturo kaj tiel proporcie pligrandigi la problemon ĝis nerevenebla punkto de ne daŭripova planedo, aŭ urĝe investi en alternativoj. Unu el ili estas plibonigi

la procezojn por pligrandigi la produktadon, redukti perdojn (pro malŝparoj dum rikoltado, transportado, stokado, vendado kaj eĉ preparado - ni en Brazilo malmulte konsumas la nutropovajn tigojn de vegetaloj, ekzemple). Tiel eblus ekhavi pli per la samaj rimedoj en la samaj jam okupataj areoj por terkultivado.

Tero por paŝtejoj kaj akvo estas du aliaj gravegaj ingrediencoj en la formulo de tradicia bestobredado. Sed anstataŭ tuta bovino por melki la lakton - kaj la kvanto da nutraĵoj kaj akvo por vivteni tiujn grandajn "laktofabrikejojn", kial ne okupiĝi nur pri la nutrado de laktodonaj ĉeloj?

Tehnologi-entrepreno proponas aldonan, tute novan aliron por lakto-produktado, kiu povas ankoraŭ soni kiel sciencfikcio. Max Rye, unu el la direktoroj de la entrepreno Turtle Tree Labs, en Singapuro, rakontis al la brita BBC pri ĝiaj esploroj pri la t.n. "ĉela agrikulturo". La entrepreno havas projekton pri laboratoria bredado de tiaj ĉeloj de mamuloj. La ĉeloj estas multobligataj, instalitaj kaj nutrataj en tre malgrandaj tubetoj, el kiuj la lakto estas poste maŝine elsuĉata.

Rye rakontas, ke la perspektivoj estas bonaj kaj ili jam eksperimentis per ĉeloj de bovinoj, kaprinoj, ŝafinoj kaj kamelinoj. La lakto estas precize la

sama kaj el ĝi oni povus fari fromaĝojn, buteron kaj aliajn ŝatatajn laktaĵojn, kiuj konsumas multajn litrojn da kruda lakto.

Aliaj entreprenoj enpaŝas en la produktado de viando per simila strategio - la multobligo de ĉeloj, kiu okazus per multe malpli da rimedoj.

Tio pensigas pri la motivoj de sciencistoj: se nia korpo kaj ĉio, kio nutras nian korpon estas kompleksaj molekuloj, kiuj estas speciale kunigitaj atomoj, principe eblas multobligi ĉelojn se oni malkovras la precizajn formulojn kaj la mekanismon, laŭ kiu ili interagas, imite al la naturo. Oni tion faras de jarcentoj per la greftado de plantoj kaj miksa bredado de besto-specioj. Nun oni faras la samon sed nur en pli mikroskopa nivelo.

Multaj iniciatoj okazas por la kreskigo de histoj en laboratorio kaj eĉ tutaj organoj por pritrakti la grandajn bezonojn de longaj vicoj de homoj, kiuj atendas jarojn por la greftado de organoj. Pensu nur pri la bezono de homa haŭto en hospitaloj de bruligitoj. Kaj pli kompleksaj organoj kiel renoj, hepatoj, eĉ la koro. Antaŭ malmultaj semajnoj okazis en Aŭstrio la unua greftado de pulmoj en pacienton, kiu suferis damaĝojn pro COVID-19.



Iom da filozofio

Noto de la Redaktoro:

La ĉi-suba artikolo unuavide tuŝas religian demandon, kaj tio povus skrapi la tradician neŭtralecon de nia Lampiro.

Tamen, atente legante ĝin, ni konstatas, ke ĝi ne celas propradire proponi religian temon, sed filozofian.

Fakte, la morto estas universala temo, en ĉiuj kulturoj, sendepende de kredoj. Ĉiu homo foje konjektas pri ĝi.

Ni vidas, ke la aŭtoro ĉi tie simple intencis starigi la problemon kaj instigi pensadon, sen ia emo kredigi aŭ malkredigi la leganton.

Tial ni konsideras la tekston tute interesa kaj kongrua kun nia revuo. Dankon, cetere, al la aŭtoro.

Kien ni iras, kiam ni mortas?

Luis Euclides dos Santos

*Ni ne estas homaj estuloj vivantaj spiritan sperton,
ni estas spiritaj estuloj vivantaj homan sperton.
(Teilhard de Chardin)*

Kiom da personoj inter ni kiam faris al si mem la ĉi-supran demandon? Kiom da personoj inter ni ŝatus scii la respondon?

La ĉefaj religioj asertas, ke nia surtera vivo ne estas la sola, kiun ni vivas. Laŭ ili, kiam nia tempo ĉi tie alvenas al la fino, ni komencas vojaĝon, kiu etendas sin dum la tuta eterneco.

En la kontraŭa direkto de la religio, la oficiala scienco defendas la vidpunkton, ke la fizika morto estas la fino de ĉio. Multaj materialismaj sciencistoj ne akceptas eĉ la ekzistadon de la konscio sendepende de la cerbo.

Malgraŭ tio, iuj malakordaj voĉoj jam aŭdiĝas. Iuj esploristoj, per multa klopodo kaj

malmulta financado, estas provintaj ŝanĝi la nuntempan materialisman vidon per nova vido, kies bazo estu la konscio.

Laŭ la katolikismo, kiam ni mortas ni trairas la privatan juĝon kaj, poste, ni iras al unu de ĉi tiuj tri lokoj: ĉielo, purgatorio aŭ infero. Tiuj, kiuj iras al la purgatorio fine iam iros al la ĉielo.

Kion ni povas fari rilate al tio? Kiel kunvivi kun la angoro ne scii kun certeco

tion, kion la estonteco rezervas al ni?

Iuj homoj vivas la vivon aŭtomate, reagante al la okazaĵoj senpripense kaj neadekvate.

Fakte, se la homoj memorus ĉiam, ke ili ne scias tion, kio atendas ilin post la fizika morto, eble ili profitus sian vivon en la Tero por realigi pozitivajn aĵojn, anstataŭ pasigi la tempon mortigante la proksimulon iom post iom en ĉiu tago. ■



La graveco de kantotekstoj kaj la ebleco uzi ilin por lernado de nia lingvo

AUGUSTO FORNITANI

Kvankam tutmonde la esperantlingva anaro ne kuniĝas laŭ etnoj, ni ja havas propran kulturon. Ne nur tio, sed nia komunumo ankaŭ prezentas al iu aparta landano aŭ etnano, tiujn kulturojn de aliaj landoj.

Specifa trajto estas, ke oni ĝuas la kulturon de Esperanto ĉefe per tekstoj: do literaturo kaj poezio abundas, tamen muzikon oni ofte ne samgrade atentis. Sed muziko estas centra punkto de etnaj kulturoj. Tial gravas, ke oni unue agnosku la gravecon de muziko ene de nia kulturo (ĝi ekzistas, kaj same bonas kiel nacilingvaj!)

Rilate al la titolo de ĉi tiu teksto, tamen: Ĉu por lernado eblas uzi muzikon? Propraj spertoj indikas, ke jes (kaj kiel lernanto, kaj kiel instruisto). Tamen persona sperto estas kompreneble sen-rigora.

Do kion diras lingvistoj pri la temo? Laŭ esploro de Rebecca Oxford en sia libro "Strategioj por Lingvolernado" (*Language Learning Strategies: What Every Teacher Should Know*), ekzistas sistematiko kun ses kategorioj pri lerno-metodoj:

1. kogna — asociadi novajn kaj malnovajn informojn;

2. mnemonika — asociadi kiel kogna metodo, sed per uzado de formuloj, frazoj, versoj kaj simile;

3. metakogna — konduki propran kognadon per kunordigo de antaŭplanado, organizado kaj taksado de la lerno-procedaro;

4. kontraŭpeza — uzi kuntekston por kompensi mankon de informoj dum legado kaj skribado;

5. afekcia — direkti emociojn, motivojn kaj sintenojn al lernado;

6. socia — interrilatoj kun aliaj gelernantoj por plibonigi lernadon kaj kulturalan komprenpovon.

Kvankam tia sistematiko nuntempe estas kritikata de koncernaj sciencistoj, ĝi daŭre estas sufiĉe klara por la ideo, kiun mi volas prezenti: muziko helpas lernadon.

Se oni konsideras la supran liston, punktoj 2, 5 kaj 6 estas aparte taŭgaj, ĉar muziko rilatas al *mnemoniko* (ĉu ne estas agrable scii kanti kune tutan kanton?), al *afekcio* (aŭskulti aŭ kanti tuj vekas sentojn kaj memorojn) kaj kompreneble *sociumado* (muziko

funkcias kiel ponto inter generacioj, kiel alvoko por kaŭzoj, kiel temo por babiloj ktp).

Do, ĉion supre konsiderante, kion diri pri kanto-tekstoj? Mia hipotezo estas, ke muziko kaj tekstoj estas nedisigebla tuto! Oni memoru ekz. pri freŝdataj premioj pri Literaturo, kiujn ricevis komponistoj Chico Buarque kaj Bob Dylan.

Tial, necesas havigi al lernantoj de nia lingvo ne nur tekstojn aŭ tradukojn de libroj, sed ankaŭ de ĉi tiu grava parto de nia kulturo, nome la muziko. La nuntempaj facilaĵoj ebligataj de interretaj sistemoj, ekz. YouTube kaj Facebook, permesis kunhavigi multajn novajn muzikaĵojn diverslandajn, ne nur de firmaoj kiel Vinilkosmo, sed ankaŭ de individuoj. Tamen mankas — kaj al Vinilkosmo, kaj al individuoj — registri la

tekstojn de tiuj kantoj!

Por tiu specifa tasko, ekzistas senpaga, libera komunumo KantarViki (<http://kantaro.ikso.net/>), kaj multaj aliaj krom ĝi. La registro de kantotekstoj permesas al lernanto kompreni la rilaton inter sonoj kaj literoj, lerni multajn vortojn, lerni per ekzemplo kiel mem fari belsonan harmonion, kaj multe pli.

Laŭ tiu sama spirito de la artikolo "POEZIUMADO: ĉu vojo al pli alta lingvonivelo? — *Lampiro* n-ro 152", mi prezentas sube tri strofojn — la unuan de la kanto "*La malnova balancilo*", de muzikgrupo Kajto, la duan de "*Enmigraĉ*", komponita de grupo Dolchamar, kun partopreno de Trackman Artifex kaj fine versojn de "*Verva Virino*", de Tone.

(Kajto — La malnova balancilo)

*Ĉe la dorso de la knabino sidas frato.
Dum li ludas, ne turmentas lin malsato.
Li firme ĉirkaŭbrake talion tenas
De la fratino kaj nuntempe li serenas.
Fermas la okulojn tiu bubo;
Supren kaj malsupren fidas li sen dubo,
Kaj plengorĝe ridas, homnatur'!
De la ĉielo al la tero: grandplezur'!*

-*-*-

(Enmigrad' — Dolchamar)

De miaj paperoj jam finiĝis

Ĉia validec'

Samkiel miaj deziroj lukti plu

Devas resti mi atendema

*Je la son' de l' Polizej**

Iras mi kun samlandanoj al drinkej'

Esperante, ke oni ne min rifuzu

ĉe la enirej'

Kaj ignorante la rigardon

De tiuj, kiuj volas deporti min

Skinheads ĉe la strato*

Atendas min...

Polizej = germana polico

*Skinhead = subkulturo, kiu post 1980-aj jaroj forte ligiĝas al rasismo,
faŝismo kaj perforto.*

-*-

(Verva Virino — Tone)

Altfrekvenca kurento, ŝia kiso

Kilo da tumultaj emocioj, nepra hiso

Hm, nepra hiso

Nepra kiso

Nepra hiso

Ne plu diso

Ne plu ĝiso ĉar...

Vi ŝetas varmon en mian animstaton

Jen per tri ekzemploj, oni povas konstati kiel bunte la esperantlingvaj komponistoj esprimas ideojn: ĉu gajeco infanaĝa, ĉu malfacilaĵoj nuntempaj de enmigrintoj, aŭ eĉ allogo de belulino...

Kiel do oni havigas tian riĉecon? Unue, la eldonejo aŭ komponistoj mem devus strebi diskonigi sian muzikon ankaŭ per teksto. Sed, ĉar tio ne okazas, necesas ke iu alia tion faru. Simpla maniero estus aĉeti Esperanto-muzikon, kaj publike dissendi fotojn pri la enaj kovriloj (ekzemple kiel faris la brila brazila reĝisoro Flávio Fonseca: ĉi tie li publike diskonigas la enhavon de sia sonkasedo "Aerlumo"). Alia ebleco, se oni nur aŭskultas muzikon, sed ne havas diskojn aŭ kasedojn, estas atente aŭdi la kanton, tajpi ĝian tekston, kaj submeti ĝin por revizio ĉe KantarViki — tiu estas mia metodo.

Margêne, ekzistas alia punkto, kial registri la kantotekstojn gravas: ili konservas nian kulturon. Pri tio, konsideru ankaŭ legi pri la

"BitArkivo" (<http://bitarkivo.org/>).

Mi esperas, ke la temo estos interesa al la leganto, kaj espereble ankaŭ (se ne ankoraŭ), vi iĝu aŭdanto! Oni strebu prizorgi ĉi tiun parton de nia kulturo, ne nur ĉar ĝi meritas konservadon, sed por ke ĝi estu kroma invito al gelernantoj de la tuta mondo. Mi feliĉas, ke mi havis la rimedojn por ne nur aŭdi — sed legi kaj kune kanti — ĉar mia tiama plej ŝatata muzikgrupo estis *Persone*, kiu diskonigas la tuton de siaj kantotekstoj per sia retejo (<https://bertilow.com/persone/kantotekstoj.html>). Sed kiam mi ekaŭskultis aliajn grupojn, ekz. Kajton, mi bedaŭrinde ne trovis similan facilecon — la tekstoj vere belas, sed por komencanto, estis terure aŭdi nur partojn, sen ebleco kompreni aŭ serĉi signifon per vortaro! Do, se vi deziras helpi komencanton, eĉ se ete kaj sen multe da laboro, jen tre oportuna tasko por nuntempa izoliĝo. ■

La paradokso de la ĝemeloj

GENILDO M. COELHO

Ekde la apero de kosmoesploro, fariĝis ofta scio ke spacvojaĝantoj ne maljuniĝas tiel rapide kiel siaj fratoj sur la Tero. Fakte, se spacvojaĝanto povus vojaĝi laŭ la lumrapido, li neniam maljuniĝus.

La fakto, ke tempo kuras pli malrapide por spacvojaĝanto, videblas, se ni aplikas la ekvacion.

$$\square = \frac{1}{\sqrt{1 - \frac{v^2}{c^2}}} \cdot \tau \dots$$

Por observanto sur la Tero, horloĝoj kaj ĉiuj fizikaj procezoj inkluzive de la vivo mem fariĝas kosmoŝipo kun rapido v , pli malrapida laŭ la faktoro

$$\sqrt{1 - \frac{v^2}{c^2}}$$

Por konfirmi niajn asertojn, ni donas la jenan ekzemplon: Konsideru du ĝemelojn A kaj B, dudekjarajn.

La Ĝemelo B komencas spacvojaĝon tien kaj reen al la stelo Arkturo kun rapido $v = 0,99$ c. Por tiuj el ni, kiuj estas sur la Tero, Arkturo situas 40 lumjarojn for de la Tero. Ni demandas: kiuj estos la aĝoj de A kaj B, kiam B revenos de sia vojaĝo al tiu

stelo?

Por la ĝemelo A, la vojaĝo daŭrus 1% pli longe ol la 80 jaroj, kiujn ĝi bezonus por iri al Arkturo kaj reveni al la Tero. Ni tiam konkludis, ke A estos 20 plus 80,8, tio estas 100,8 jaroj, kiam B revenis de la vojaĝo. Por ĝemelo A, la horloĝoj de la kosmoŝipo funkcias pli malrapide pro faktoro $\sqrt{1 - 0,99^2} = \sqrt{0,02} = 0,141$. En la kosmoŝipo, la tempo prenita por la vojaĝo tiam estus 0,141 oble la 80,8 jaroj de la Tera tempo, tio estas 11,4 jaroj. Ĝemelo B havus 20 plus 11,4 jarojn aŭ 31,4 jarojn ĉe la fino de la vojaĝo. Ni tiam konkludis, ke li estos 69,4 jarojn pli juna ol sia ĝemela frato, kiu restis sur la Tero.

La spacvojaĝanto ne rimarkas, ke lia tempo kuras pli malrapide. La Ĝemelo B vidas la distancon al Arkturo mallongigita per la kuntiriĝo de Lorentz. Ĝia mezuro de la distanco de la Tero al Arkturo estas 40 lumjaroj $\times \sqrt{1 - 0,99^2}$, tio estas 5,64 lumjaroj. Ankaŭ kontrolu ke la Tero malproksimiĝas kun la sama relativa rapido $v = 0,99$ c. Tiel ĝemelo B, en la kosmoŝipo, kalkulas, ke la tempo por atingi Arkturon estas ekzakte 1% pli longa ol la tempo, kiun bezonas lumo por trairi la 5,64 lumjarojn. Li pensas, ke necesas 5,7 jaroj por atingi Arkturon aŭ 11,4

jarojn por rondiro. Ĉi tiu rezulto konformas al la kalkuloj de la ĝemelo A, kiu estas sur la Tero.


Tamen ĉi tie aperas paradokso. Kiam la spacvojaĝanto rigardas malantaŭen, al la Tero, li trovas, ke surteraj horloĝoj malrapidiĝis rilate al liaj. Ŝajnas, ke B ricevu la rezulton, ke A estas pli nova, kio kontraŭas nian antaŭan rezonadon. Fakte, se rapideco estas vere relativa, kiel ni povas atingi tian nesimetrian rezulton?

Pro kialoj de simetrio, ĉu ambaŭ ĝemeloj ne devas fini en la sama aĝo? Unuavide ŝajnas, ke la formalismo de Einstein estigas kontraŭdiron. La paradokso estas solvita, se oni

rimarkas, ke ĉi tiu problemo estas esence nesimetria. La viro, kiu restas sur la Tero, ĉiam restas en la sama referenca sistemo, dum la spacvojaĝanto ŝanĝas la referencan sistemon kiam li komencas reveni.

Ĝusta apliko de la ekvacioj de Einstein ankaŭ donas la rezulton, ke rilate al la spacvojaĝanto, la tuta efiko estas, ke restado sur la Tero fariĝas pli malnova.

Estis multjara disputo pri la paradokso de la ĝemeloj, sed hodiaŭ preskaŭ ĉiuj fizikistoj akceptas la interpreton, ke vere la viro, kiu restas sur la Tero, maljuniĝas rilate al tiu, kiu faras spacvojaĝon. ■



Librorecenzo

PAULO SÉRGIO VIANA

“Ĉasisto de Songôj“

Aŭtoro: Julian Modest

Eldonejo Libera, 2019

La bulgaro Julian Modest estas fekunda aŭtoro. Li jam publikigis amason da verkoj, precipe novelojn kaj romanojn, kiuj jam solidigis lian nomon en la panoramo de la Esperanta nuntempa literaturo. Tute merite, ĉar liaj tekstoj estas ĉiam legindaj, agrablaj, fluaj kaj tute personaj. Vere plezurige estas legi liajn historiojn.

Modest ŝajne havas fortan inklinon al nelongaj noveloj. Eble senatentaj legantoj povus pensi, ke nelongaj noveloj estas simpla, senpretenda ĝenro. Tute male. Ili postulas talenton kaj ekvilibron flanke de la verkanto: la scenoj devas desegniĝi objekte kaj rapide, ne perdante la klarecon; la frazoj devas esti precizaj, sen multe da ornamoj, sufiĉaj por krei etoson; kaj la tuto devas finiĝi per tia maniero, ke la menso de la leganto plu funkcii, surbaze de la rakontitaĵo. Necesas plena regado de



la lingvo kaj de la ritmo, en la tuta teksto. Modest majstre regas tion.

“Ĉasisto de Revoj“ estas kolekto de 27 tiaj nelongaj noveloj, kaj ĉiuj atingas la celon: atentokaptaj, neordinaraj, vivecaj, naturaj kaj allogaj. Oni povus supozi, ke por atingi tian bonan rezulton, la aŭtoro elektus bizarajn, strangajn temojn. Sed ne. Li elektas plej ofte situaciojn de la ordinara vivo. Li pentras ilin per mildaj akvarelecaj trajtoj, sen troigoj kaj sen tro fortaj koloroj. La tuto sonas delikate kiel fluta sonato. La tekstoj estas harmoniaj, belsonaj, la frazoj egalpezaj kaj trafaj. La etosoj inter homoj kaj la pejzaĝoj

estas ĉiam agrablaj kaj ĝuindaj, eĉ kiam la rakonto mem alportas ian malĝojon aŭ malfeliĉon.

Kurioza konstanta trajto de la rakontoj de Modest estas iliaj finaĵoj. Li ne klopodas transdoni al la leganto surprizon, aŭ frapan solvon por malfacila situacio, aŭ neatendeblan konkludon por neordinara homa sceno. Li simple finas la rakonton, foje sen propradire konkludo. Foje li lasas al la leganto proponon, ke oni meditu pri la afero, ke oni lernu ion el tiu historieto. Li rifuzas fini siajn novelojn per “spektakleca solvo”, li simple finas ilin, kiam li opinias, ke jam nenio restas por skribi. Tia estas la vivo: plej ofte ĝi ne prezentas spektaklojn...

Por aparte mencii unu el la noveloj en ĉi tiu volumo, ni aludu al tiu, kiu donas titolon al la tuta libro: “Ĉasisto de Songôj”. En ĝi, la aŭtoro rapide, per lertaj penikstrekoj, pentras la personecon de la ĉefa persono, nome altstatura maldikulo, kiu vagas de urbeto al urbeto por vendi okulvitrojn kaj rakonti fabelojn kaj songôjn. Kaj la simpla historieto finiĝas poezie: “Mi ne scias, ĉu tiam, kiam mi estis infano, mi kredis je liaj

miraklaj songôj, sed la ĉasisto de songôj malfermis antaŭ mi pordon de mirinda mondo kaj igis min revii. Ja, en la vivo nepre devas esti iu, kiu montros al ni la vojon de la revoj.”

Alia kurioza aspekto de lia prozo estas lia stilo, kiun oni povus eble nomi “novromantikismo”. Por klarigi tion, mi preferas doni ekzemplojn. En liaj rakontoj “... la ĉielo diafane bluis...”

“... la suna lumo estis kiel akvofalo...”

“... dentoj kiel etaj perloj...”

“... la folioj de la kaŝtano falas kiel larmoj...”

“... la vento hurlis kiel malsata lupo...”

Tamen, ne pensu, ke tia poezieca maniero konstrui la rakontojn tro sukerigas ilin! Tute ne. Temas pri delikataj ornamoj en ĝusta mezuro, por fari la legadon leĝera, kolora kaj plaĉa. Oni legas kun sento de ripozo, de refreŝiĝo. Nur spertaj, talentaj verkistoj sukcesas proponi al la leganto tiajn agrablajn promenojn, kvazaŭ oni irus en milda bosko, en freŝa venteto. ■

ANNA LOBO

EMINENTA CIVITANO

Originala nomo: El Ciudadano Ilustre
 Direktoro: Mariano Cohn kaj Gastón Duprat
 Aktoroj: Oscar Martínez, Dady Brieva kaj Andrea Frigerio
 Lando: Hispanio kaj Argentino
 Tipo de filmo: Dramo
 Lanĉo: 04.09.2016 (Festivalo de Venecio)
 Tempo-daŭro: 118 minutoj

Mi ege dankas al Mauro Prongiante, kiu indikis tiun ĉi specialan filmon por ke mi recenzu. Ne estos facile skribi pri ĝi sen malkaŝi multon, sed eblas rakonti sufiĉe por instigi vin spekti ĝin. Estas mojosa etoso kiu kreĝas en disvolviĝo kaj okazaĵoj de la filmo, kaj antaŭ ol scii tion ne estos bona eco por bone ĝui spektadon. Fakte, tiu ja estas defio ne nur por verkado de ĉi tiu filmo, sed ja por ĉiuj.

Tiu ĉi filmo parolas pri Daniel Mantovani, fama argentina verkisto, kiu jam atingis nivelon en vivo en kiu nenio pli vivigas lin. Li ege enuas, tediĝas. Kvazaŭ io mankas, iu vivskvado. Kaj ricevi nobel-premion ne multe helpis, ĉar laŭ li, la arto verki estas provoki, skui, ne akcepti aferojn kiel ili estas. Por li tiu premio montras ke io vere fuŝas. Li do ne plu verkas, ne plu akceptas ajnan renkontiĝon...

... Ĝis kiam li ricevas inviton de sia ege eta hejmurbo en



Argentino - Salas - por ricevi nomumadon de “eminenta civitano” ... Tien li ne plu iris jam de jaroj.

Kaj, kiel logante sian animon, li decidas iri.

Kiajn konsciigojn li havos tie?

Kiajn travivaĵojn?

Kio estis vero? Kion li imagis?

Kiom Salas reprezentas nian socion?

Kio estas la valoro ligiĝi al personaj vantecoj?

Mi certas ke vi amuzigos akompanante tiun apartan kaj nekutiman verkiston, kiu havas interesajn psikologiajn ecojn. Malgraŭ ke ĝi estas konsiderata “dramo”, ankaŭ ĝi amuzos vin pro absurdaj situacioj. Cetere, la aktoroj estas ege bonkvalitaj en siaj roloj kaj la filmado mem ankaŭ estas tre bela en argentina regiono. Mi deziras al vi bonan spektadon, kaj ĝis sekva filmo! ■

Lingvaj Respondoj

FRANCISCO S. WECHSLER

Demando

Lastatempe, precipe inter junuloj, oni ofte legas frazojn, en kiuj aperas verbo post prepozicio. Ekzemple: **Post labori**, *li vizitis sian amikon*. **Malgraŭ li suferis**, *li postvivis*. En la verko *Ĉasisto de Sonĝoj*, Julian Modest skribis: **Antaŭ ekmanĝi**, *la viro demandis [...]*

Okaze de la lanĉo de PIV 2020, akademiano Carlo Minaja demandis akademianon Bertilo Wennergren, ĉu oni rajtas uzi la esprimon **per fari**. La respondo estis: *mi ne vidas problemon*. Kion vi pensas pri tio? Ĉu tio akordiĝas kun la uzado en la *Fundamento de Esperanto*?

Respondo

Koncize: se oni deziras, ke la teksto plene konformiĝu al la zamenhofa stilo kaj liaj konsiloj, oni uzu antaŭ verbo nur la prepoziciojn *por*, *anstataŭ* kaj *krom*, kaj nur se temas pri verbo

en la infinitivo. Do ĉiuj kvar ekzemploj cititaj en la demando estas eraraj laŭ tiu ĉi kriterio. Ĝustaj formoj estus: **laborinte** (aŭ: *Post kiam li laboris*), *li vizitis sian amikon*; **malgraŭ ke li suferis** (aŭ: **kvankam li suferis**), *li postvivis*; **antaŭ ol ekmanĝi** (aŭ: **manĝonte**), *la viro demandis [...]*; **per farado** (aŭ: **farante**). Ankaŭ akcepteblaj, kvankam ne striktadire zamenhofaj, estus: **post ol labori...** (aŭ: **post ol li laboris...**) kaj **antaŭ kiam li ekmanĝis ...**

Pli detalan diskuton vi trovos ĉi-sekve.

En la *Fundamento* troviĝas pluraj ekzemploj nur pri la prepozicio *por* + infinitivo; interalie:

Tial, por meti finon al ĉiuj malkompreniĝoj kaj disputoj, [...] (*Antaŭparolo*, 1905)

[...] ĉar tio ĉi estis feino, kiu prenis sur sin la formon de malriĉa vilaĝa virino, por vidi, kiel granda estos la ĝentileco [...] (*Ekzercaro*, 1905)

[...] **por esprimi** direkton, ni aldonas al la vorto la fĥnon “n”; [...] (Ekezeraro, 1905)

Unu fajrero estas sufiĉa, **por eksplodigi** pulvon. (Ekezeraro, 1905)

Multaj pliaj ekzemploj pri la kombino de *por* kun infinitivo troviĝas ekster la Fundamento en la verkaro de Zamenhof; interalie:

Por konvinki tiun sinjoron, ke li eraras, mi prenis la libron kaj tradukis ĝin. (La Batalo de l' Vivo, 1891)

Mi volonte / El tie venis tien ĉi, **por fari** / La servon mian ĉe l' kronado via; [...] (Hamleto, 1893)

Ni kunvenis hodiaŭ, **por montri** al la mondo, [...] (Parolado ĉe la Unua Kongreso, 1905)

Tamen mi konfesas, ke mi havis nenian kaŭzon, **por uzadi** la prefikson “ge” sole en la dirita maniero. (Respondo 6, La Revuo, 1907, Februaro)

Por hundon **dronigi**, oni nomas ĝin rabia. (Proverbaro Esperanta, 1910)

Tute senfolia staris nun la kverko, **por ripozi** dum la tuta vintro [...] (Fabeloj de Andersen 4, 1916)

La ĉi-supra fakto tute ne signifas, ke la uzado de aliaj prepozicioj antaŭ

verbo iel kontraŭas la Fundamenton. Efektive, Zamenhof uzis ankaŭ la prepoziciojn *krom* kaj *anstataŭ* antaŭ infinitivo en sia verkaro.

Uzoj de la prepozicio *krom* + infinitivo troviĝas ĉe la sekvaj ekzemploj ekster la Fundamento:

Vi nenion povas fari krom kunbati viajn dentojn [...] (La Rabistoj, 1908)

Sed kion alian ili ankoraŭ povoscias krom danci, [...] (Fabeloj de Andersen 2, 1916)

Ne ekzistas alia bono por la homo, krom manĝi kaj trinki [...] (Malnova Testamento, 1916)

Mi scias, ke ekzistas nenio bono por ili, krom ĝoji kaj fari bonon en sia vivo. (Malnova Testamento, 1916)

[...] kian profiton havas ĝia mastro, krom vidi ĝin per siaj okuloj? (Malnova Testamento, 1916)

Uzoj de la prepozicio *anstataŭ* + infinitivo troviĝas ĉe multaj ekzemploj ekster la Fundamento, interalie:

[...] anstataŭ analizi, ĉu mi bone kereis la vortaron [...] (Dua Libro, 1888)

[...] anstataŭ postuli, ke li nepre uzu [...] (Lingvaj Respondoj, 1889–1913)

[...] multaj el ni posedas nian lingvon ankoraŭ tre malbone kaj malfacile balbutas, **anstataŭ paroli** flue; [...] (Paroladoj, 1904–1913)

[...] **anstataŭ** blinde **ripetadi** frazojn, [...] (Esenco kaj Estonteco, 1907)

[...] Sed la patro, **anstataŭ afliktiĝi** kiel la patrino, [...] (Marta, 1910)

Kaj venis kontraŭ lin Tiglat-Pileser [...], kaj premis lin, **anstataŭ subteni** lin; [...] (Malnova Testamento, 1916)

La “malpermeso” uzi aliajn prepoziciojn kun infinitivo fontas ne el la *Fundamento*, se el tri *Lingvaj Respondoj*, kiujn oni rigardu ne kiel leĝodonajn, sed kiel konsilojn:

[...] la esprimojn “li faris ĉion sen ridi” aŭ “li restis du tagojn sen manĝi” mi **ne konsilus** al vi uzi. Prepozicion antaŭ verbo mi konsilus uzi nur en okazo de **neceseco**, se alie ni ne **povas** bone esprimi nian penson. Sed anstataŭ “sen ridi” aŭ “sen manĝi” ni povas ja tre bone diri “sen rido”, “sen manĝo” aŭ “neniom ridante”, “nenion manĝante”. (Respondo 20, *La Revuo*, 1907, Junio)

Ŝajnas al mi, ke [...] vi simple esprimas vian opinion, ke en Esperanto oni uzas la infinitivon nur aŭ en formo de rekta komplemento (ekzemple “mi amas danci”), aŭ en formo de nerekta komplemento kun la prepozicioj “por”, “antaŭ (ol)”, “anstataŭ”, kaj ke en ĉiuj okazoj, kiam oni bezonas uzi la infinitivon kun iu alia prepozicio, oni devas uzi anstataŭ ĝi participon aŭ substantivon kun prepozicio (ekzemple: “li foriris, ne preminte lian manon” aŭ “sen premado de lia mano” anstataŭ “sen premi lian manon”). Via opinio ŝajnas al mi ĝusta. (Respondo 30, *La Revuo*, 1908, Februaro)

Ĉiu prepozicio, laŭ sia logika esenco, povas esti uzata nur antaŭ substantivo. Sekve se antaŭ vorto, kiu havas verban sencon, ni deziras uzi prepozicion, ni devas doni al tiu verbosenca vorto la formon de **substantivo**; ekzemple: anstataŭ “kun saluti”, “sen respondi” ni devas diri “kun saluto”, “sen respondo”. Se la vortoj “por” kaj “anstataŭ” estas uzataj kun la infinitivo, ili tute ne prezentas ian escepton, sed la kaŭzo de tia uzado estas alia, nome: la vortoj “por” kaj “anstataŭ”, uzataj antaŭ infinitivo, havas la sencon ne de pura prepozicio, sed preskaŭ de konjunkcio, kaj

en tiuj okazoj la uzado de substantivo apud ili estas ne ebla; ekzemple, en la frazo “anstataŭ stari li sidas” ni ne povas anstataŭigi la formon “stari” per “staro”, dum ĉe ĉiu alia prepozicio **pura ni ĉiam** povas uzi la verbosenca vorton en formo de substantivo (ekzemple, “sen ia diro” anstataŭ “sen ion diri”). (Respondo 37a, *La Revuo*, 1908, Majo)

Tamen Zamenhof mem uzis la prepozicion sen kun infinitivo almenaŭ dufoje; sed ja temas pri fruaj ekzemploj, kiujn lia posta stilo ne sankciis:

[...] la timo, ke li ne povas subskribi per sia nomo dokumenton, [...], **sen elmeti** sin al ia ankoraŭ ne konata danĝero [...] (*La Batalo de l' Vivo*, 1891)

[...] mondo, super kiu la suno neniam leviĝas **sen rigardi** milojn da sensangaj bataloj (*La Batalo de l' Vivo*, 1891)

Ankoraŭ pli rimarkindan escepton Zamenhof faris nur unufoje; kaj denove temas pri frua ekzemplo, kiun lia matura stilo ne sankciis:

Tio ĉi neniel devus nin deteni de enkonduki tiun ĉi oportunajon en nian artan kaj konscie kreitan lingvon. (*Lingva*

Respondo, 1891)

La argumentojn de Zamenhof kontraŭ la uzado de aliaj prepozicioj antaŭ infinitivo mi persone ne opinias plene konvinkaj. Temas efektive pri tradicio (aŭ “tabuo”, laŭ PMEG). Nuntempe, almenaŭ la uzado de *sen* + infinitivo jam disvastiĝis, kaj ne plu estas rigardata kiel erara, krom de ĝisostaj zamenhofistoj.

La dua ekzemplo de la demando (*malgraŭ li suferis, li postvivis*) estas iom pli tikla, ĉar ĝi plivastigas la gramatikan rolon de *malgraŭ*. Alivorte, oni proponas, ke *malgraŭ* funkciu ne nur kiel prepozicio, sed ankaŭ kiel konjunkcio (aŭ frazenkondukilo, laŭ PMEG), kio farus superflua la konjunkcion *kvankam*. La utileco de tia modifo estas miaopinie dubinda. ■

LA BLUA  SONGÔ



J. M. Progiante



Autor: J.M. Progiante
Editora: Esprima, 2019
Formato: 19 cm, 60 páginas

Capa dura com ilustrações coloridas

Sequência do livro “La malbeno de Tarumo kaj Nurana” com os personagens reunidos, agora na Bélgica, para solucionar um novo mistério envolvendo o roubo de um diamante.

Preço: R\$ 39,00



Dank on!

